

Espero

Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Jun. 1906.)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

«Unum ovile et unus pastor.» (Joh. X, 16.) «Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta.»

ABONEJOJ de E. K.

- FRANGLANDO { Ĉe la Direktoro de E. K.
Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, PARIS, V°
Ĉe librejo Warnier kaj K°, 46, rue Sainte-Anne, PARIS.
- ANGLOLANDO { S-o O. Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON
British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand,
LONDON, W. C.
- BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.
- BOHEMUJO-AŬSTRIO : F. Topič. libr. Ferdinandova 9, PRAĜA.
- ĈILILANDO : S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, SANTIAGO-CHILI.
- HOLANDUJO : S-o U. B. van QUET, Ueereneg, 51 bis, UTRECHT.
- HUNGARLANDO : S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO.
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRINO DE PORDENONE (*Udine*).
- HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias, VALENCIA.
- GERMANLANDO : Moller et Borel, 95, Prinzenstr, BERLIN.
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.
- RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjaĉeskaja, 24. loĝ. 12. S. PETERBURGO.
- SVISLANDO : Librejo Garin, 20, rue Corraterie, GENEVO.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro.
— Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : { En Francando : 4 frankoj. | Unu numero :
 Ekster — 5 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝtmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

La koloro de l'adresaj etiketoj indikas la komencon de l'abono : blanka, de oktobro; flava, de januaro; verda, de marto.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn; — duona paĝo — 25 fr.; — 4^a paĝo : 15 fr.; — 8^a paĝo : 9 fr.; — 16^a paĝo : 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 46, rue Sainte-Anne, Paris.

MUSIKAĴOJ DE S-INO JOSÉE GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenof.	1 fr.
En Songo, poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i> .	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski.	1 fr. 20

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro). Ĉiu jaro 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.) Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr. — (La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite). Artikoloj legindaj en la kolekto : Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier), Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée; skizo; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista. Raporto historia pri la Qunuajn jar. de E. K., ktp. ktp.

BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).	0 fr. 50
(La du verkoj kune mandataj 0 fr. 75)	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II ^a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.	0 fr. 15
Esperanto?... Qu'est-ce?... Franca broŝur. propag.	0 fr. 10

ESPERO KATOLIKA

Honorata per apostola beno de PIO X-a
la 27-an de Jun. 1906.

ARTIKOLARO :

Progresado aŭ morto (<i>sekvo</i>) — LA DIREKTORO)	193
Evolucio de la Religia Ideo (D-ro A. MELIN)	197
La Bestoj malsanigitaj de la pesto (A. DENONCIN)	205
Poezio : « Kiel tion rebonigi ? » (E. J. WEMAES)	206
Preĝo al la Sankta Virgulino, de abato Perreyve (Tradukis L. MILHO)	208
La aventuro de Konnero (S-ino M. MILSON)	208
Propaganda kroniko (E. P.)	213
Paĝo de l'Direktoro	216
En la mondo Esperantista : Raporto pri Esperanto inter la blinduloj (Th. CART) ,	218
Ŝakoj.	223

PROGRESADO AŬ MORTO (*Sekvo*) ¹

II

Mi plenesperas en Dio; sed tamen mi ne forgesas, ke Dio atendas miajn penadojn. Mi do pripensis la rimedojn por sukcesi en la ĉiamplia disvastigo de *Espero Katolika*. « Helpu vin mem, diras konata proverbo, kaj Dio vin helpos. » Jen la rezultato de miaj pripensoj.

Sukceso de gazeto	}	1. INTERESO.
dependas de		2. DISVASTIGO.
		3. REGULA APERO.
		4. MONO.

(1) Vidu *Espero Katolika*, n-o 36-a.

Blanka etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de oktobro.

1. INTERESO dependas de	{ Nuneco kaj intereso de l' artikoloj. Diverseco de la temoj pritraktitaj. Stilo, aŭ valoro de l' kunlaborantoj.
2. DIVASTIGO dependas de propagando :	{ En gazetoj naciaj. Per <i>persona</i> agado de abonantoj. Per reklamo.
3. REGULA APERO dependas de	{ La Direktoro. La Presisto. La Poŝto.
4. MONO venas :	{ Per abonantoj. Per anoncoj. Per monoferoj.

Ni komentariu tiun tabelon

1. **Intereso.** — Pli kaj pli mi zorgos por ke la nuntempaj demandoj estu pritraktataj en *Espero Katolika*. Mi deziras el miaj kunlaborantoj, — krom literaturaj artikoloj, — informojn pri la religia movado, la katolika vivo, la organizadoj katolikaj, la socialaj demandoj, ktp., en sia lando. *Espero Katolika* devas samtempe *utili* kaj *plaĉi*. Ĝis nun mi ricevis pli da literaturaj ol da nun-aferaj artikoloj...

Aliparte « pluraj » legantoj (mi ne povas diri *multaj*, nek *kelkaj!*) plendas pri la tro granda spaco dediĉita al *Revuo de Revuoj* kaj aliaj aferoj Esperantistaj, kiujn oni legas en ĉiuj gazetoj. Tiu riproĉo estas atentinda. Jam *La Revuo*, *Espero Pacifista*, k. c. forlasis la Esperantistajn demandojn por pli kaj pli specialiĝi. *Espero Katolika*, ankaŭ devas esti *speciala*. Tamen pro ĝia deziro disvastigi Esperanto'n inter la katolikoj, ĝi ne povas entute silenti pri la Esperantistaj gazetoj kaj aferoj. Tiu parto estos do redaktata de nun sub formo de *Kroniko*, ne analizante la enhavon de ĉiuj gazetoj.

El la komunikaĵoj pri Esperantaj aferoj, ni enpresos

Pripensu ĉiu « oktobr-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

nur tiujn, kiuj venos el grupoj aŭ personoj abonintaj al *Espero Katolika*.

— Ni ofte ricevis komplimentojn pri la stilo de niaj kunlaborantoj. Ni plezure ilin resendas al niaj amikoj. Ni uzas la okazon por rekomendi al tiuj, kiuj volas skribi en gazetoj, la studadon de la bonega *Esperanta Sintakso*, de S-o Paul Fruictier (1). Ĝi havigos stilon tute internacian, sekve klaran kaj facile kompreneblan por ĉiuj.

2. Disvastiĝo. — Grava kaj eĉ necesa estas aktiva propagando, por la sukceso de gazeto. Ĝis nun mi ne havis tempon por propagando, kaj sekve la nombro da abonantoj nur malrapide kreskadis.

Mi rekomendas al la amikoj de *Espero Katolika* rimedon tre simplan, kaj tamen tre efikan. Traduku en via nacia lingvo artikolojn iajn de *Espero Katolika* kaj publikigu ilin en katolikaj revuoj aŭ ĵurnaloj, *citante la devenon* kaj farante mallongan antaŭparolon pri Esperanto, per kiu vi povis liveri la informojn tradukitajn. Ne forgesu citi, fine de l'artikolo, la adreson de *Espero Katolika* aŭ de ĝia *Delegito en via lando*.

Alia rimedo estas la *persona agado* de abonanto sur aliaj personoj, *per ordinara konversacio*. Turnu vin precipe, se vi povos, al personoj influaj: direktoroj de gazetoj, junaj pastroj, estroj de katolikaj lernejoj, virinoj altrangaj, k.-c.; ĉar persono influa varbos siavice aliajn personojn pro sia alta situacio.

La reklamo estas tre multekosta kaj devas esti farita *po-grande* aŭ neniel farita. Mi ne povas ĝin konsili, nek... uzi.

3. Regula apero. — Jen punkto pri kiu *Espero Katolika* de kelka tempo meritas riproĉojn! La Direktoro estas *materiale* kulpa... Sed de nun li promesas regulan ape-

(1) La *Presa Esperantista Societo* anoncas novan eldonon de tiu libro.

ron. La presisto ludas en tio gravan rolon. Post senutilaj penadoj, mi devigis la presiston de *Espero Katolika* subskribi specialan kontrakton pri tio; kaj fine mi devas lin forlasi. Mia timo estas, ke nova presisto ne estos pli diligenta!...

La Poŝto! Ni parolu iom pri la poŝto! La numeroj de *Espero Katolika* perdiĝas, La pakajoj senditaj al Delegitoj estas malligitaj dum la vojaĝo kaj dise revenas al mi, aŭ ne revenas! Numeroj estas resenditaj kun noteto, ke la abonanto estas mortinta, kvankam li estas tre vivanta! ktp. ktp. Ni insiste rogas legantojn ke ili ĉiam protestu ĉe sia poŝtoŝicejo, kiam ni certigas, ke la numero perdita estis sendita de ni.

4. **Mono.** — Jen la granda kaŭzo de sukceso por ĉiuj homaj entreprenoj. Mi sufiĉe parolis pri la neceso varbi novajn abonantojn. Mi volas altiri la atenton al la dua fonto de mono: *la anoncoj*. Ĝis nun la gazetoj Esperantistaj ĝe ĝnis, kredeble, la konfidon de la anoncaj agentoj. La plej malgrandaj ĵurnaletoj lokaj havas anoncojn, kaj tamen ni ne povis altiri al ni la komercistojn. — La devo de l'Esperantistoj pri anoncoj estas duobla: 1^o penadi por ke la komercistoj anoncu en la gazetoj Esperantistaj; aŭ, se ili estas mem komercistoj, sin turni al la Esperantista gazetaro; 2^o aĉeti tion, kion ili bezonas prefere ĉe la komercistoj, kiuj anoncas ĉe ni, *ĉiam citante la gazeton*, kie oni legis la anoncon. — La monoferoj estas nur eksterordinara fonto de vivo por gazetoj. Oni devas danki fervore la malavarajn donacantojn. Sed estas dezirinda ke gazeto provu vivadi sen tiu helpo.

*
* *

Nun mi konkludas. La laboro antaŭ ni estas grandega; sed la divido de l'laboro inter multaj igas ĝin facile farebla. Ĉiu do elektu parton de la tasko, laŭ siaj emoj kaj ecoj. Ne lasu min penadi sola en la redakcio, en la propa-

Pripensu ĉiu « Januar-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

gando, en la ĉiamplia perfektigo de *Espero Katolika*. — Ĉiu el vi fosu sulkon, ĵetu semon, kaj baldaŭ la kampo estos kovrata de admirinda rikolto!

LA DIREKTORO.

EVOLUCIO DE L'RELIGIA IDEO

L'esperantista gazeto *Internacia Sciencia Revuo* ĵus publikigis serion da artikoloj pri « Evolucio de la religia ideo ». Ni donas al la legantoj de *Espero Katolika* resumon de tiuj artikoloj, al ĉiuj ni rapide respondos.

L'aŭtoro certigas, ke la homo elirante iom post iom el sia primitiva besteco kaj ekkonsciante pri sia personeco dediĉis unue kulton al fetiĉoj (ŝtoneto, besta dento, ŝela peceto), kiujn li konsideris kiel kaŭzojn de sia konstanta prospero eviti la multnombrajn danĝerojn dissemitajn de la kosmosaj fortoj. Laŭ la aŭtoro, tiuj fortoj estis kaŭzoj de morto tro oftaj por ke multaj homoj povu atingi maljunecan aĝon. Oni rimarkis, ke ju pli besto estas forta, des malpli ĝi estas kruela; kaj la primitiva homo, kiu estis tre muskolhava, estis ankaŭ tre grandanima. Li manĝis homkarnon, sed pro sia grandanimeco li mortigis sian venkitan malamikon nur instigate de malplena stomako. Pro tio li logike opiniis, ke la kosmosaj fortoj estos danĝeraj, nur kiam ili estos malsataj. Tiu rezonmaniero instigis la homon oferi bestojn al tiuj timindaj fortoj. Sed ĉar la kosmosaj fortoj havis nek buŝon, nek dentojn, oni opiniis, ke oni devis bruligi la oferaĵojn por ilin aliformigi en fumon. La muŝoj, kiuj altirite de bruligata viando flugetis are super altaro, ŝajnis materiaj enkorpiĝoj de kosmosaj potencaĵoj! Poste la homo decidis, ke li donos nomojn al tiuj fortoj, kiuj tiamaniere fariĝis tiom da specialaj diaĵoj. Tiel naskiĝas la politeismo,

Verda etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de marto.

kaj ni « eniras en la veran historion ». Uf! ne estas bedaŭrinde, ke ni eniras en la veran historion!

L'aŭtoro montras la politeismon en Egiptujo kaj Grekujo. Sed la profetoj antaŭgardas la hebreojn kontraŭ la politeismo. Fine alvenas Jesuo, la plej granda el la profetoj!

La penso pri nemateria kaj nemortebla animo naskiĝis jene: kiam la homo plene akiris la senton de sia personeco, la morto ŝajnis al li sensencaĵo, neeblaĵo, kaj li penis per malsimplaj ĥemiaĵoj antaŭgardi la malvivan korpon kontraŭ la detruado. Sed li neniam sukcesis, ĉar eĉ la plej multekostaj mumioj havas kun la homa formo nur tre malproksiman similecon. Oni do estis devigita elpensi la nematerian kaj nemorteblan animon!

Kaj tiu ideo subtenita de la granda aŭtoritato de Platono tre rapide disvastiĝis. Tio komprenigas la sukceson de Jesuo ĵetanta tra la Roma mondo sian grandan kriadon al espero. Sed la unua zorgo de la novnaskita kristanismo estis neniigi (Jam la estingilo!) la literaturajn kaj artistajn ĉefverkojn, ĉar la artistaj kultoj ne povis liveri la moralan nutraĵon, kiun bezonas la homaro alpensanta al la Senfineco. Tiam io grava okazis la memmortigo ŝajnis al la kristanoj la plej bona rimedo por alveni pli frue al la eterna vivado; kaj se la episkopoj ne estus kontraŭstariĝintaj, la homaro tiel estus senhomiĝinta! Ĉar la materia memmortigo estis malpermesata, la kristanoj elpensis la moralan memmortigon kaj ili eniris en monaĥejojn, Nun, ne la episkopoj, sed la *Granda Kosma Forto* stariĝis por savi la homaron, inokulante en homan organismon bezonojn kaj apetitojn!

Tamen, se la veneno (la kristanismo!) ne neniigis la homaron, almenaŭ ĝi tiel malfortigis ĝin, ke la Barbaroj ne multe penadis por penetri la putrintan imperion kaj dividi inter si ĝiajn pecojn. Sed siavice la Barbaroj fariĝis suferantoj de tiu sama komunikigita malsano kaj tiam komenciĝis la malluma mezepoko.

Pripensu ĉiu « mart-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

Poste venas perforta atako kontraŭ la Katolika Eklezio kaj la papeco, kiu laŭ la aŭtoro estas hodiaŭ rapidigata en abismon kiel la defalinta ĉefanĝelo. La esperantistaj katolikoj tre miros legi tiajn atakojn, nure politikajn kaj neniel sciencajn, en *Internacia Scienca Revuo*, en la oficiala organo de *Internacia Scienca Oficejo Esperantista!*

Ekzameninte la estintecon, la aŭtoro ĵetas nun rigardon al la estanteco kaj vidas ke la mondo estas dividita nur inter du specoj da religioj, kiuj tiel malmulte diferenciĝas (precipe kristanismo kaj budhanismo), ke oni povas kredi ne utopie, ke ili devige renkontiĝos kaj konfuziĝos en unu sola.

Daŭrigante sian revadon, la aŭtoro direktas nun sian lornon al la estonteco...

*
* *

Jen tio, kion oni devas elpensi por forigi Revelacion! L'aŭtoro donas nenian pruvon; li nur rakontas; li donas al si la facilan rolon de sonĝrakontanto. Plene sorbigita de la ideo pri Evolucio, li ekprovas ĝin al fari al la historio de la religioj. La plej malgranda pruvo multe pli plaĉus kaj valorus en tia temo, ol ĉiuj belaj frazoj per kiuj la aŭtoro vidigas sin pli revema poeto ol serioza scienculo. Laŭ la atestoj de la scienculoj plej kredindaj pri tiu temo, oni scias, ke la plimulto el la religioj, anstataŭ ĉiam progresadi, returnen iradis forlasante iom post iom sian primitivan purecon. Tio estas konstatebla ekzemple pri la religio de la Egiptoj.

Sed la senpruvaj certigaĵoj estas arego en la artikolo. Jen la aŭtoro diras ke la similaĵoj troveblaj en la kristanismo kaj la budhanismo estas nur klarigeblaj per la natura dependeco de la kristanismo rilate al la budhanismo! Kial do li ne pridiskutas la supernaturan klarigon donitan al la kristana Religio? Kaj kial do l

Memoru, ke ni devas aldoni o fr. 50 pro pagigo per poŝto aŭ banko.

supozas *a priori* ke ĉiuj religioj havas nur kaŭzon naturan. Sendube, oni trovas similaĵojn inter la religioj naturaj kaj nia supernatura Religio, sed tiuj similaĵoj trovas sufiĉan tialon en la komuna celo de ĉiuj religioj. Kiel ĉiuj religioj, supernatura religio devas kontentigi la bezonojn kaj la emojn de la homa naturo. Estas facile sed kontraŭ-science forĵeti tiun klarigon antaŭ ol ĝin ekzameni. Anstataŭ ekzameni unue la estintajn aŭ malproksimajn religioj, kiuj estas nur pli malpli bone konataj, kaj anstataŭ klarigi, per la principoj pli malpli logike fortiritaj de tiu ekzameno, la devenon kaj la naturon de la kristanismo, ĉu ne estus pli logike kaj ankaŭ pli science komenci per la grandaj nunaj religioj kaj, resuprenirante tiamaniere de la konato al la nekonato, serĉadi kiaj estis la religioj de l'estinteco? Kian argumenton starigas la aŭtoro por pruvi ke la fetiĉismo estis la unua religio? Neniam, aŭ nur fantaziaĵojn! Al tio oni povas kontraŭmeti la opinion de Max Muller « La fetiĉismo estas parazito kiu kreskis sur la religio; sed ĝi neniam estis la unua produktaĵo de la homa koro. » Kaj Max Muller diris ankaŭ « Ju pli mi ellernas, des pli mi kredas, ke oni serĉas vane postsignojn de fetiĉismo en la plej malnovaj religiaj dokumentoj kiuj al ni restas, kaj ke oni vidas ilin multobliĝi ĉe la postaj epokoj. »

Same, sen pruvo, l'aŭtoro certigas, ke la homo elirante el la besteco ekkonsciis iom post iom pri sia personeco. Kvazaŭ la scienco estus plene solvinta la problemon de nia deveno, kaj pro la bezono de sia tezo, li trairas per unu paŝo la netraireblan interspacon, kiu disigas la homon kaj la beston. Tamen la paleontologio neniam liveris al ni nedubajn restaĵojn de pera stato inter besteco kaj homeco; kaj Virchow mem, tiel rimarkinda pro sia scienco kiel ne suspektinda pri spiritualismo, konfesis: « En la demando pri la homo ni estas plene venkitaj. Ĉiuj esploroj celantaj trovi la senintermankon en la

Sendu vian abonpagon HODIAU, vi gajnos 0 fr. 50.

progresema disvolvado estis vanaj. Estas nenia Praantropo; estas nenia homo-simio; la pera ĉenero restas fantazia! » Plie la komuna saĝo stariĝas kontraŭ tiu hipotezo. Se la homo estas la lasta aliformiĝo de la simia idaro, kial do oni ne trovas en la mondo vivantajn specimenojn de la peraj modeloj? Kial do oni trovas ankoraŭ simiojn en la landoj kie naŝkiĝas kaj multobliĝas la homoj? Kial do tiuj simioj estas nun neperfektiĝeblaj? Ĉu la Granda Kosmosa Forto, la Granda Universa Enerĝio ilin forĝesis aŭ maljuste forlasis?

Sendube gravaj argumentoj stariĝas por la hipotezo pri la aliformiĝo de la specoj; sendube tiu hipotezo estas tre alloga; eble eĉ, kiel antaŭ nelonge diris S^{ro} de Lapparent, la impresio ricevita el la rigardado de la paleontologia mondo estas malfacile akordigebla kun alia sistemo; sed kiom da malfacilaĵoj restas nesolvitaj! Kaj kiom malutilas la veran sciencan la malmoderuloj kaj la revemuloj!

Por ne longigi supermezure nian artikolon, ni devas preterpasi multajn senpruvajn certigaĵojn de l'aŭtoro. Ni do forlasis la mallongdaŭron de la vivo de niaj antaŭhistoriaj prapatroj, ilian senhumilecon, kiun agrable incitis la petegoj de la venkito kaj kiu faris ilin grandanimaj, la devenon de la buĉado aŭ de la bruligado de la oferaĵoj, la muŝojn flugetantajn are super altaro, kaj aliajn revaĵojn... Jen ni alvenas al la progreso de la homaro evolucianta al la politeismo. Kun la politeismo, diras la aŭtoro, ni traŭditos la plej brilajn periodojn de l'homaro. Reale, la progreso de la fetiĝismo al la politeismo ne estas tiel brila. Fetiĝismo estas kulto al individuaj aŭ familiaj Spiritoj enhavataj de malgrandaj objektoj; politeismo estas kulto al kosmosaj fortoj, al kiuj la homoj donis nomojn, kaj kiujn ili diigis. Ĉu tio estas vera progreso? Tion ni ne kuraĝus certigi. Cetere fetiĝismo kaj politeismo povas facile kunesti ĉe la idolanaj popoloj la

Blanka etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de oktobro.

ideo pri la dieco similas putrintan korpon, kiun dispecetigas arego da insektoj.

Laŭ la aŭtoro la hebrea monoteismo grave reenpaŝigis la religian ideon! Ni ne opinias, ke la kredo al unu Dio estas restaĵo de la ĥaldea tridieco; ni ne opinias, ke Javeh estis unue « speco de fetiĉo, de hejma Laro, nediskuteble pli malsupera ol Zeŭso »!

Multe da tempo antaŭ kiam audiĝis la voĉo de la grandaj profetoj, Javeh estis rigardata kiel la Universa kreinto, sendependa kaj superreganta, tiel pli supera ol la fantazio kaj la racio, ke la homo ne povis Lin kompreni, kvankam li povis Lin koni. La plej alta elmontraĵo de la kulto al Dio, la ofero, ĉiam estis trovebla ĉe la hebrea popolo; ne, kiel la aŭtoro senpruve certigas, spite la predikoj de la profetoj, sed kun ilia plena aprobo. La malpermeso celis nur la oferojn al idoloj, ĉar tiuj oferoj ne estis akordigeblaj kun la ideo monoteista, kun la kredo al unu sola Dio.

En tiu popolo aperas la lasta profeto, la plej granda el ĉiuj, kredeble, sed tamen simpla profeto Jesuo! Kiaj estas laŭ la opinio de l'aŭtoro, la rilatoj inter Judaismo kaj kristanismo? Ĉu la kristanismo estas natura kaj logika sekvo de la Judaismo? Aŭ ĉu la kristanismo estas nova religio, la Religio de Jesuo? Jen: Jesuo ekkaptis la hebrean religion kaj en ĝin enŝovis iajn budhanajn kredaĵojn! Tion ni ne prediskutos: ni simple neos, kion oni simple certigas.

Nun, ni alvenas al tiuj neatenditaj atakoj kontraŭ la Katolika Eklezio kaj la papeco. Oni ripetas aron da riproĉoj, mallaŭdoj, kulpigoj, kiujn la Eklezio milfoje refutis venke per la voĉo de siaj doktoroj kaj apologistoj. Kiam aperis Jesuo, la popoloj aŭdis lian grandan kriadon al espero, ne pro la evolucio de la ideo de Nemortebleco, sed pro lia superega dogmaro kaj ĝiaj promesoj. Gravega demando tiam stariĝis la batalo de la vero kontraŭ la

Pripensu ĉiu « oktobr-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

eraro, de la bono kontraŭ la malbono. Inter ambaŭ oni devis elekti, kaj oni komprenas, ke multe da kristanoj ne ŝanceliĝis suferi kruelan morton anstataŭ malkonfesi la solan kaj veran Dion. L'aŭtoro kuraĝas nomi tion Memmortigo ! Memmortigintoj, la Martiroj ! Memmortigo do, la sinofero de la kuraĝuloj, kiuj mortas por la Religio, la Libereco, la Patrujo !

La materia memmortigo malpermesita estis anstataŭita de la morala memmortigo, diras la aŭtoro. Jes ! multaj kristanoj altrudante bridon al siaj pasioj elektis idealon, kiun neniam komprenos tiuj, kiuj komprenas nur materion kaj vivas nur por ĝi ; jes la batalo de la spirito kontraŭ la karno, de la superega idealo kontraŭ la malaltaj emoj de nia korpa naturo sendube entuziasmigis multe da animoj ; sed la kristanismo tute ne celis altiri ĉiujn homojn al tiu pli perfekta vivmaniero, kaj la Granda Universa Energio ne estis devigata, por kontraŭbatali tiun idealon, inokuli en la homan organismon bezonojn kaj apetitojn tiuj-ci per la volo de la Kreinto jam ekzistis antaŭe. Tiuj riproĉoj estas tiel eraraj kaj maljustaj kiel la kulpigo, laŭ kiu la indiferenteco de la kristanoj al ĉio, kio rilatas la teraĵojn, estus ebliginta ke la barbaroj almilitu la Imperion. La kristanoj ĉiam zorgis pri la defendo de la patrujo tiel bone kiel aliaj ; por ĝin defendi ili ne timas la morton. Tiaj kulpigoj senpruvaj estas maljustaj kaj malsinceraj ! Ĉu la Eklezio kun ĉiuj siaj monaĥoj ne savis la civilizitan mondon kontraŭ la barbaroj ?

Sed jen komenciĝas la mezepoko : « Malluma periodo kaj profunda nokto. » Kompatinda mezepoko ! Oni tro mallaŭdis ĝin ! Ĉiel perfekta ĝi ne estis, sendube ; sed ĉu ĝi ankaŭ ne obeis la leĝojn de evolucio ? Kaj ĉu ne fariĝas prava tiu parolo de granda verkisto de la 19^a jarcento « Oni baldaŭ ridos pri tiuj, kiuj ridis pri la mezepoko ? » Estas danĝere moki aŭ mallaŭdi niajn antaŭulojn, kiuj ne

havis la esplorilojn, kiujn ni havas. Ĉu ne estas kredeble, ke post kelkaj jarcentoj niaj posteuloj ridos pri niaj samtempuloj, kiuj, laŭ sia opinio, vivas en la jarcento de la Lumo ?

Neniam la Katolika Eklezio kontraŭstariĝis la Sciencajn progresojn. Heredinte dogmaron malsupren-irintan el la Ĉielo, ĝi konsciis sian neeraremecon pri la religiaĵoj ; sed aliparte, laŭ la ekzemplo de sia Dia Majstro, ĝi liveris la materian mondon al la diskutadoj de la Scienculoj ; kaj ĝiaj fideluloj ja multe kunhelpis al la progreso de la Sciencoj. Ofte malsinceraj kontraŭuloj faras la Eklezion responda pri malbonaĵoj, pri kiuj senkulpa ĝi estas, ĉu ĉar ilin la Eklezio mem ne iniciatis, ĉu ĉar ĝi starigis nur principojn tute pravigeblajn per la tiamaj ideoj. Oni ne povas juĝi la pasintajn faktojn per niaj nunaj ideoj. Sed la aŭtoro eltiris el la kontraŭreligia armilejo eluzitajn kaj rustiĝintajn armilojn. Galileo kaj la « auto da fé » ! Oni tro ofte refutis tiujn atakojn, kiujn kontraŭuloj pli obstinemaj ol veremaj reaperigas de tempo al tempo. 'Ci-tie ne estas loko por rea refutado.

Nun, ĉu ni respondos al la mallaŭdinda komparo inter la respektinda maljunulo de Vatikano kaj la defalinta ĉefanĝelo ? Je la nomo de la scienco, en la oficiala organo de *Internacia Sciencia Oficejo Esperantista*, l'aŭtoro finas sian antaŭreligian artikolon per insultoj al la papo. Tiamaniere, li sekvas ne nur la dogmaron, sed ankaŭ la ekzemplon de Ernesto Haeckel, kiu ne povas elparoli la nomon de la papo ne elĵetante insultojn el sia buŝo. L'aŭtoro montras la papecon kiel venkitan povon, la papon kiel falintan ĉefanĝelon ! Sed se tio estas vera, kial do li tiel baraktas kontraŭ la papo ? 'Cu oni bezonas tiel perforte ataki tian malfortegulon ? 'Cu estas noble daŭrigi batojn kontraŭ malamiko teren faligita ? Kaj ĉu do la aŭtoro havas malpli da grandanimeco aŭ pli da apetito ol niaj muskolhavaj prapatroj duonhomaj kaj

Pripensu ĉiu « Januar-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

duonbestaj? Cetere Haeckel ne havas tiel kontentigan opinionon pri la papeco. Antaŭ nelonge, dum publika parolado, li montris la papecon kiel povon pli kaj pli arrogantan kaj timindan, antaŭ kiu kliniĝas eĉ la ne katolikaj princoj, kiuj, laŭ lia diro, veturas Romon por fari sian « vojaĝon al Canossa ». Sed oni komprenas la timon de Haeckel : li ankaŭ deziras fariĝi papo, papo de nova religio, la Monismo, kiun li nomas (Ho! tre humile!) la « plej granda progreso de la homa Spirito »!

D-ro A. MELIN (*Andenne, Belgl.*)

LA BESTOJ MALSANIGITAJ DE LA PESTO

Malsano kiu teruriĝas por ĉiu kreitaĵo, malsano, kiun kolerante la Ĉielo elpensis por sendube sin venĝi pro la abomenindaj agoj de l'mondo; la pesto, ĉar mi devas ĝin nomi, la pesto kiu ĉiutage deĵetas en Aidon animojn sen-nombrajn, bataladis kontraŭ la Bestoj. Tiuj-ĉi ne mortis ĉiuj, sed ĉiu el ili estis vundita de la malsano.

Oni ne vidis plu iun el ili penanta por la subtenado de sia mizera vivado, cetere por ili la manĝaĵo ne estis plu ekscitema kaj sekvis de tio ke la lupoj kaj la vulpoj ne spionis plu por fari estaĵojn dolĉajn kaj senkulpajn akiro al si. La kolomboj forflugis lasanta unu la alian, ili do ne plu amindumis, tial nenio plu ĝojigis ilin.

La leono kunsidis, kaj diris : Miaj karaj amikoj, mi opinias ke pro niaj pekoj la Ĉielo permesis tian malfeliĉegon. Ke do la plej grava kulpulo el ni oferu sin al la venĝemo de la kolereganta Ĉielo; eble pro tio ĉiu resaniĝos. La Historio sciigas min ke, ĉe tia okazo, oni vidas tian sindonemon; ni do estu ne flatemaj kaj esploru malkaŝe nian konsciencon.

Mi, pro mia grandega apetito, fervore englutis multajn ŝafojn. Ĉu ili diris al mi ofendajn vortojn? tute ne; kaj

Verda etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de marto.

eĉ okazis ke mi manĝegis ankaŭ la paŝtiston. Mi do oferos min se tio estos necesa, sed mi pensas ke estus oportune se ĉiu kulpigus sin kiel mi, ĉar la justeco postulas ke la plej kulpa el ni pereu.

Via Ekscelenca Moŝto, diris la vulpo, estas tro bona reĝo ; viaj konscienc-duboj el montras grandan delikatecon. Nu ! manĝi ŝafojn, malsaĝulojn, friponulojn, ĉu estas peko ? Ne, ne ; vi, tiel agante, ilin honoris multe ; kaj la paŝtito estis inda je kia malfeliĉo ajn, ĉar li estis el tiuj ĉi anaroj, kiuj aljuĝas al si ĥimeran imperion kaj pretendas submeti la tutbestaron. Tiel paroladis la vulpo kaj ĉiu flatulo aplaŭdis.

Oni timis esplori la plej ne pardonindajn pekojn de la tigro, de la urso kaj de kelkaj aliaj potenculoj. Ĉiu malpaculo kaj eĉ la korthundo fariĝis sanktuletoj laŭ la diro de ĉiu.

Vice alvenis azeno kiu rakontis : Mi memoras ke, pasante tra unu monaĥan herbejon, la malsato, l'okazo, la freŝa herbeto kaj precipe ia demono ajn instiganta min, en tiu-ĉi herbejo mi tondis tiom da larĝeco kiom havas mia lango ; sed mi konfesas, ne rajte. Ĉe tiuj ĉi vortoj, la kunsidaro ekkriis : Ve ! sentaŭgula estaĵo ! la lupoj, iomete instruita, pruvis per sia priparolado, ke oni devis oferi ĉi tiun malbenitan, senharigitan kaj malpurigitan beston de kiu venas ĉiu malbonaĵo. Lia kulpeto estis inda de la pendigo. Manĝ aliulan herbon ! Kiel abomeninda faro ! Nur la morto povos elpigi tian krimon. Kion oni tuj pravigis.

Se vi potenculo estus, la korteguloj vin senkulpigus ; sed, se mizerulo, ili vin kulpigus.

El france tradukis A. DENONCIN.

KIEL TION REBONIGI ?

Se malsaĝe vi agadis
Kaj konsilo ne plu helpas,

Pripensu ĉiu « mart-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

Ĉar l'afero jam pereis :
Kiel tion rebonigi ?

Multe da infanoj vidas
Nur ekzemplon de malvirto,
Kaj malvirte ili kreskas.
Kiel tion rebonigi !

Junularo sin preparas
Al la vivo familia
Per plezuroj malhonestaj.
Kiel tion rebonigi !

En la domo, se geedzoj
Ne paceme vivas, baldaŭ
La diablo ludas mastron.
Kiel tion rebonigi !

Post malŝparo tuj alvenas
La mizero, disputado,
Malameco kaj batalo.
Kiel tion rebonigi !

Kial inter samlandanoj
Tia stranga malamego,
Maljusteco kaj envio ?
Kiel tion rebonigi !

Kial tiuj militadoj ?
Tiu maro da fratsango,
Kiun drinkas nun la tero ?
Kiel tion rebonigi !

Oni ve ! forgesis leĝon :
Amu Dion super ĉio,
Amu unu la alian.
Kiel tion rebonigi !

Estu virta, laborema,
Konsiliĝu kun saĝulo,

Kaj vi diros tre malofte :
Kiel tion rebonigi !

Dio ! donu vian pacon,
Kaj konduku nin en lokon,
Kie oni ne plu diras :
Kiel tion rebonigi :

Loven (Louvain) 28-an de Marto 1905.

Originale verkis : E.-J. WEEMAES.

PREĜO AL LA SANKTA VIRGULINO (DE ABATO PERREYVE)

Virgulino sankta, meze de viaj gloraj tagoj, ne forgesu la terajn malĝojn. Ĵetu bonecan rigardon al tiuj, kiuj estas en suferoj, kiuj bataladas kontraŭ malfacilaĵoj kaj ne ĉesas trempi siajn lipojn en la maldoĉojn de l'vivo.

Kompatu al tiuj, kiuj sin amis kaj estas apartigitaj ! Kompatu al la soleco de l'koro ! Kompatu al la malforteco de nia fido ! Kompatu al la objektoj de nia amo ! Kompatu al tiuj, kiuj preĝas, kiuj tremas, kiuj ploras ! Al ĉiuj donacu Esperon kaj Pacon ! Tradukis : L. MILHO.

LA AVENTURO DE KONNERO

Estis finita la aŭtomobila kurado.

Lia Grafa moŝto, ekscite kaj malbonhumore, tien ĉi kaj tien iradis en la ombraj aleoj de sia ĝardeno.

Ĉiufoje kiam li alvenis en proksimeco de sia aŭtomobilejo, lia frunto profunde sulkiĝis. Ĉar menuu el la ĉi tieaj multekostaj aŭtomobiloj sukcesis havigi al li la plej malgrandan premion. Ĉu ne ĉiuj liaj amikoj estis konvinkitaj, ke li estos venkanta en la kurado ?

Sendu vian abonpagon HODIAU, vi gajnos o fr. 50.

ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Sviesą“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siūsti reikia pagąšio adresu: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

Antrasai boikotas Lietuvoje.

Kalvarijos lietuviai apskelbė paskutiniomis dienomis savo „lenkams“ **boikotą**. Kaip žinome jau, rugsėjo 9 d. š. m. Kalvarijos miestiečiai, vadinantieji save lenkais, surengė su policijos ir dragunų pagelba lietuvių skerdynes bažnyčioje ir ant šventoriaus. Pagalios, šaip nuolat daro visokias lietuviams šunybes, daužo langus ir t. t. Tokie nedorūs Kalvarijos „kulturiškųjų“ miestiečių pasielgimai teisingai užrustino Kalvarijos apygardos lietuvius ir tie pastarieji, norėdami atpratinti savo nemandagius svečius nuo jų šunybių, nutarė juos boikotuoti. Mums prisiūsta liko brošiurėlė vardu „Antrasai boikotas Lietuvoje“, Kalvarijos apygardos lietuvių kuopos išleista, kurioje raginami visi Kalvarijos apygardos lietuviai prie to boikoto prisidėti ir nurodomos priežasties, dėlėi ko tasai boikotas apskelbtas.

Aprašę Kalvarijos lenkų, „kulturiškus“ pasielgimus brošiurėlės autoriai sako:

„Tautiečiai! Lietuviai, broliai sesers! Ar mės vis ramiai žiūrėsime į tokius nelabus išgamų darbus? Ne! Gana jau to snaudulio!

Gal pamislysite, broliai, kad reikia tvertis už lazdų, akmenų ir už muštynes muštynėmis atlyginti?

Ne, anaipatol ne! Griebkimės mūsų už ginklo doriško! Šalyn lazdos, šalyn akmenys, šalyn tokis atmonijimas!

Pabusk tiktai tautieti, brolau, sesuo, praplėšk akis ir pažiurėk į tuos judošiškus mieščionių darbus, o pažiurėjęs pasakyk netiktai žodžiu, ale ir širdžia: **gana!** Gana betvarkės bažnyčioje, gana langų lietuviams daužymo! Pasakęs gana, griebkis už ginklo doriško, **už boikoto!** Kad išgamos nesiliauja tų savo galvažudiškų darbų, tad mūsų skirkimės nuo jų o skirkimės tokiu budu....

Neduokime darbo, nei pirkime gatavų drapanų, nei batų iš pikčiausiųjų tvaikos ardytojų, iš langų daužytojų.... Neduokime jokio darbo nei kitiems lenkams ir lenkėms kaip siuvėjams, kurpiams, taip ir stalioriams, dailidėms! Neneškime jiems savo kruvinai uždirbto skatiko, jeigu jie bažnyčia, Dievo namus, pikčiau kaip į kokią karčiamą apverčia! **Eikime tik pas savuosius!** Trumpai sakant: iš mieščionių lenkų nieko nepirkime, pas juos nedirbkime, jiems darbo neduokime, su jais lenkiškai nekalbėkime, pinigus paskolintus iš jų atimkime! Tarnai ir tarnaitės, pabaigę metus tarnystos pas mieščionis lenkus, begkimė nuo jų, neklausykime daugiau jų piktžodžiavimų iš bažnytnių apeigų, idant jie naužkrėstų mūsų širdžių nedoromis savo kalbomis ir paselgimais! Šalinkimės pagalios nuo išgamų mūsų, visi lietuviai, kaip nuo kokių piktų žvėrių! Parodykime jiems, kad ne mūsų pas juosius Lenkijoje, o tiktai jie pas mus, Lietuvoje gyvena ir su mumis taikytis privalo! Jeigu

jie nori viešpatauti, tai tegul... pakėlę skvernus, tegul i Varšavą, į Kriokavą drožia ir ten tegul sau viešpatauja, tegul sau langus daužo, tegul sau muštynes kelia, tegul ten bažnyčiose rėkauja! Męs eikime tiktai pas savuosius. Šalyn su išgamomis! Šalyn su ištvirtėliais! Šalin su galvažudžiais! Šalin su bažnyčios ardytojais, su langų daužytojais! Te gyvuoja lietuvių vienybė! Šalinkimės ir nuo tų, kurie šio atsišaukimo nepaklausys, ir nepaliaus su langų daužytojais, bažnyčioje tvarkos ardytojais draugavęsi, pas mieščionis lenkus tarnaus, jiems darbą duos arba pas juos dirbs.

Te gyvuoja Lietuvos broliai ir sesers pirmiviai ! Visi už vieną ir kiekvienas už visus! **Te gyvuoja lietuvių vienybė.**

Prieš suvienytą tautos vienybę subyrės ir pragaro jiegos!!!“

Svarbiausieji atisitikimai.

Rusijoje platinasi vis smarkiau **badas**. 17 gubernijų Rusijos rytuose ištisai bado apimtos. Apie keturiosdešimts milijonų gyventojų be duonos, pryversti žolių šaknis kramtyti. Žmonės miršta, tartum marui užėjus. Krinta vaikai negalėdami dasišaukti iš motinų duonos. Krinta vyrai ažuolai. Visi sodžiai tartum išmirę. Viešpatauja bado tifas, kolerina ir kitos baisiosios ligos. Tukstančiai badaujančių šaukiasi pagalbos, duonos. Komitetai įsteigti badaujančiųjų aprupinimui negali nieko beveik padaryti, kadangi jųjų izde beveik tuščia. O mūsų ministariai mėto šimtus tukstančių rublių kur papuolė, jiems nerupi bado mirštantieji....

Žinių-žinėlės.

Vilnius. „Vilniaus Žinios“ maino savo pakraipą, nors, tiesą sakant, iki šioliai jos neturejo beveik jokios pakraipos. Dabar bus jos pritaikomos prie lietuvių krikščionių—Demokratų nuomonės. „V.—Ž.“ № 271 patilpo V.—Ž.“ redakcijos vardu atsišaukimas kun. J. Tumo parašytas, kuriame tarp kitko pasakyta, jog „V.—Ž.“ nors nebus laikraščiu dvasišku ir ypatingai tikėjimui netarna, tačiau „aržiai gins nuo pasikesinimų ant katal. tikejimo“ teip-pat nors „nebūs kitų tautų edejū: nei lenkų, nei rusų, nei žydų“—tačiau „visomis savo išgalėmis stengsis atremti kitataučių pasikesinimus ant jų kalbos namie ir viešose įstai-gose“.—Pažiūrėsime gi kaip gins, nes pastarais laikais tai labai silpnai lietuviystę tebeginė.

— Lenkai pastatė naują kandidatą nuo Vilniaus miesto į Dūmą, miesto galvą p. Venslavskį, lenkomaną teipat. Vaikščioja kalbos, kad lenkai siulo žydams du atstovu nuo gubernijos, kad tik tie padėtų jiems išrinkti iš miesto atstovą lenką.

Peterburgas. 2 (15) d. Degtinės pardavimo skyrius praneša apie vyriausias dėgtinės pardavimo pasekmes 28-iose gubernijose ir srytyse 1906 metuose Degtinė buvo parduodama ant 15068389 ketvirtainių varstų ploto žemės su 132,240,000 gyventojų abiejų lyčių. 1905 m. parduota 72,037,174 kibirų 400 monopoliuose, daugiau kaip 1904 metuose 4,224,496 kibirais. Pelno su išlaidomis 812,487,888 rubliai, išlaidų 169,234,878 rub, gryno pelno 443,253,011 rublių. sulyginant su 1904 metais, gryno pelno nuo monopolių gauta daugiau 56,599,863 rub.

Redaktorius ir leidėjas kunigas Juozupas Ambraziejus.

M. Kuktos spaustuvė. Dvorcovaja, 4.

Sed, la ĵaluza diino de l'Venko kronis Hungaron per la unua prezo ! La duan ŝi donis al Hispano.

Tiela disreviĝo estis neelportebla... Ĉu malbona ŝanco? Ĉu ruza faro de l'hejtisto ?

Lia Grafa moŝto estis certa, ke ne la aŭtomobilo mem de l'Hungaro estis kaŭzo de la venko. Ĉar, en ĉiu vidpunkto ĝi ja estis por tio malpli taŭga ol liaj propraj ; — la supereco konsistis en la lerteco de l'hejtisto. Mirinde tiu ĉi estis kondukinta la maŝinon en la konturoj ; sen eksciteco li kuradis, kvazaŭ li estus certa pri la venko.

Dum tia malgaja monologo, alvenis al la grafo la ĝojiga penso, ke li eble povos varbi por si la kondukiston de l'Hungaro. Tiel, li estus certa pri la sukceso.

La Hungaro loĝis en Parizo, — sekve la Grafo facile povis ekkoni la nomon de la kondukisto. Tuj li skribis, ke li deziras lin dungigi, ke li venu je fiksata tempo por preparoli la aferon. La kondukisto, nomita Konnero, Italo per naskiĝo, alvenis je la signata horo.

Unue, la Grafo lin multe komplimentis pro lia lerteco ĉe la lasta kurado, kaj demandis kiom lia mastro donis al li el la ricevita premio. Konnero ekkoleris, insultis kontraŭ sia avara mastro kiu nur lasis al li kvarcent frankojn :

« Se mi ne estus estinta la kondukisto », li aldonis, « la maŝino tuj estus dispecigita dum tia rapidega veturado. Tute por nenio ja taŭgas la veturilo. »

Eĉ dudek minutoj pli frue mi estus atinginta la celon, sed mi timis pro la maŝino ! »

Grafo de Villeneuve vivece rediris :

« La tutan premion mi donus al vi, Konnero, se vi estus mia kondukisto ! Mi estas Franco ; — nia malavareco estas fama. Mi konfesas ke ni estas iom vantaj ; — pro tio sufiĉas al ni la famo. Ĉu vi volas akcepti la oficon kiun mi oferas al vi, kun kvincent frankoj ĉiumonate, kune kun la tuta premio de la venonta kurado ? »

« Via Grafa Moŝto », respondis Konnero, « vi oferas al mi pli ol mi pensis, sed malfeliĉe mi jam decidis pri simila ofico ĉe la barono Xaveraz, kaj mi estas ligita per mia promeso ».

La grafo pensis « Efektive, la feliĉo forflugas de mi; sed, promeson de hejtisto oro povas neniigi! »

Kaj, sin turnante al li « Se vi venas kun mi, Konnero, cent frankojn mi aldonas al via pago! »

Ĉe tiuj vortoj, la viro ekpasas la manon en sia densa, nigra hararo. Li ŝanceliĝas. 'Ci tie, ĉe la Grafo, oni promesas multe da mono; ĉe la Barono loĝas la ĉarma Johanino, kiun li amas kiel povas ami flama Italo. Li edziĝos kun ŝi tuj kiam li estos kunmetinta sufiĉan sumon... Konnero ŝanceliĝas;... li demandos al sia Johanino.

Du tagoj poste, li estis dungita ĉe la Grafo. Fervora turisto kaj sportamanto tiu ĉi estis; treege li deziris foriri el Parizo en sia plej bona aŭtomobilo por fari ekskurson en Svisujo.

Konnero, kontraŭe, malkontenta pri tia rapideco, petis ke oni lasu al li kelkajn momentojn por preni en hotelo sian valizon, enhavantan la plej necesajn objektojn por la vojaĝo.

Iom malkvietiĝinta pro la timo, ke sia fama kondukisto eble povus en la lasta momento lin forlasi, Grafo de Villeneuve decidis ke ili ambaŭ iros por preni la pakajon.

Tien ili tuj veturis.

Ne sian valizon, tamen, sed sian Johaninon Konnero havis en la hotelo! 'Car la severa baronino, kies ĉambristino ŝi estis, ne permesis ke konnero tie vizitu sian fianĉinon, la geamantoj sin renkontis en hotelo. Tie ili devis sin diri adiaŭ antaŭ longa foresto.

Kompreneble Konnero iom koleris pri tio, ke la grafo venis kun li. En sia koro li malbenis tiun novan situation. Tamen sukcesis al li kaŝi sian koleron.

Alveninte antaŭ la hotelo, Konnero laŭte fajfadis.

Pripensu ĉiu « oktobr-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

Fenestro tuj malfermiĝis, kaj la bela Johanino surprize ekvidis ke Konnero ne estis sola.

Rapide Konnero desaltis de sia sidejo, suprenkuris la ŝtuparon kaj trovis la amatinon.

Al la Grafo la tempo ŝajnis longa, ankaŭ li deiris de la veturilo.

Fine, Konnero alkuris, suprensaltis sur la automobilon, — sed sen la valizo.

« Kie do estas via pakaĵo? » ekkriis la Grafo.

Konnero nur svingas per la mano kontraŭ la hotela enirejo.

Tuj la Grafo rapidas, deprenas valizon en la koridoro, ĵetas ĝin en la veturilon, kaj ili forflugas.

Alvenintaj al la Svisa landlimo, la aŭtomobilistoj sin submetis al la ordinaraj formoj de la impostejo. 'Ciuj paperoj estis en ordo; jam oni estis preta por la foriro, kiam alkuras kolera oficisto. Li montras la valizon :

— Tio ĉi ne estas vizitita !

La Grafo kviete rimarkas « Ĝi nur enhavas la vestojn de mia hejtisto. »

Nur tiam Konnero ekvidas la pakaĵon, kiun la Grafo tiel rapide kun si prenis.

Oni malfermas la valizon interne estas paketo. Tre singardeme, malrapide oni malvolvas ĝin. — Kio aperas ?

Poŝhorloĝoj, ringoj, diamantoj, ĉio lumetas, ĉio brilas. La Grafo kaj Konnero ambaŭ mutiĝas pro surprizo. La oficistoj sin rigardas reciproke; tuj mastro kaj servisto estas ĉirkaŭataj.

— Arestataj pro kontrabando, decidu la estro.

— Kiel? mi, Grafo de Villeneuve, kontrabandisto? indignas la mastro. Tio ĉio apartenas al mia kondukisto, fripono, kiu sin prezentis al mi sub la nomo de l'fama Konnero.

— Sensencaĵo! 'Cu vi ne prenis mem la valizon en la hotelo kaj ĵetis ĝin per propra mano en la veturilon ?

Flava etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de Januaro.

Krias la Grafo « 'Cu vi ne montris ĝin al mi ? »

Alvenas policistoj. Ili rekonas juvelojn forŝtelitajn en Parizo. Mastro kaj servisto nun devas pasigi la nokton en malliberejo !

Baldaŭ tamen la polico suspektas ian eraron. Oni telegrafas Parizon ; la respondo estas favora al la kulpigataj.

La vera ŝtelisto, dum tiu tempo, estis laŭtege plendinta pri la malapero de sia valizo. Li faris pri tio tielan bruegon ke lin ankaŭ la polico arestis.

Tuj Grafo kaj kondukisto estas liberigataj. La Grafo petis, ke Konnero lin senkulpigu, ĉar per sia nesingardemeco li, Konnero, estis suspektata. Konnero petis ke lia mastro lin senkulpigu pro liaj koleraĵoj.

— Diru nun, Konnero, kion do vi en la hotelo serĉis ? Vi ja nenion havis por forpreni ?

— 'Cu via Grafa Moŝto ne vidis la virinan manon svingantan naztukon ? Mi tiam diris adiaŭ al mia amata Johanino. Kiam vi parolis al mi, ĉe mia foriro, mi montris la domon ! mi pensis nur pri ŝi, kiun mi devas lasi dum longaj semajnoj !

— Kial vi ne tuj diris al mi la veron, Konnero ; tiel, granda malagrabraĵo estus ŝparita al ni.

— Oni ĵaluze kaŝas la trezoron de sia koro !..... Mia Johanino estas de mi pli multeŝatata ol io alia !

— 'Cu vi deziras edziĝi kun ŝi ?

— Ies, certe, tuj kiam mi posedos la necesan sumon.

— Kiom do vi bezonas ?

— 'Cirkaŭ kvin mil frankojn.

— Bone, Konnero. Por ke vi ne konservu tro malbonan rememoron pri via nokto ĉe la svisa landlimo, jen kvin mil frankoj ! Post nia reveno, edziĝu kun via Johanino, por ke vi neniam plu estu enŝlosata pro ŝi !

— Via Grafa Moŝto, mi ĵuras ke vi estos la venkanto ĉe la venonta kurado !

• Pripensu ĉiu « Januar-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

Oni povas kredi te tio efektiviĝis, ĉar la diino de l'amo nun kondukis la lertan manon de l'fama hejtisto.

(El germana lingvo : *Revue du Touring-Club Suisse*).

Esperantigis: S-ino M. MILSOM.

PROPAGANDA KRONIKO INTER KATOLIKOJ

ITALA

Oni legas en Franca revuo ilustrita *Rome* (feb.) sub la titolo *Jubileo de Kardinaloj Gottikaj Kopp*: « La Kolegio de Propagando prezentis, la 10-an de Januaro, al kardinalo Gotti « akademion poliglota », t. e. literaturan kun sidon en 33 lingvoj... Oni rimarkigas, ke *Esperanto* aperis por la unua fojo en tia « Akademio ». — Dank'al la senlacaĵoj de Monsinjoro L. Giambene, Esperanto fariĝas pli kaj pli konata inter la Romaj katolikoj. Tiu progresado ankoraŭ plikreskos, kiam en Romo estos fondita *Esperantista Katolika Oficejo*.

Il Crociato, ĵurnalo katolika, publikigata en Udine, donis tre plenan kurson pri Esperanto. La lecionoj, kiuj kredeble estos presitaj en volumo, estas verkitaj de nia amiko kaj kunbatalanto, Pastro J. Bianchini. Ni rekomendas tiun libron al niaj Italaj amikoj, kiam ĝi estos presita.

BELGA

Namur. — En la seminario de Namur estas ĉirkaŭ dudek esperantistoj, « kiuj tre amas *Espero Katolika* kaj abonos ĝin post ilia pastrigo ».

En la seminario de *Liège* estas ankaŭ multaj Esperantistoj. Sed pri ili ni ne havas informojn.

En lernejo katolika de *Saint-Trond* fondiĝis grupo Esperantista « *Excelsior* », inter la lernantoj. La Estro de la kolegio, R. P. Decoene, Redemptorista religiulo, estas

Verda etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de marto,

fervora Esperantisto. « La Belga pastraro, li skribas, kaj ĝenerale la katolikoj, havas grandan simpatian kaj admiron por *Espero Katolika* kaj ĝia Esperantista agado. » La Religiuloj *Picpus'aj* en Courtrai, la Religiuloj de l'*Sankta Spirito* en Lierre, la *Josefistoj* en Melle, la religiulinoj Ursulinoj en Londerzeele, la *Fratinoj de Karito* en Looz, la *Franciskaninoj* en Anvers, la *Fratoj Minoraj* en Turnhout, estas Esperantigitaj.

Oni sin proponas, en Saint-Trond, traduki la Katekismon de Buller, uzata en la misioj de Nord-Okcidenta Kanado kaj en la Danaj Antiloj. Lernolibro por aŭdi konfesojn estas ankaŭ en preparo.

'Ce la *Cercle Catholique*, Anvers, D-ro Ern. Leclercq, sekretario de l'grupo Esp., estis invitata, dum lasta vintro, por fari paroladon pri Esperanto. « D-ro Leclercq, en elokventa konkludo, montris la necesecon, por katolikoj, esti ĝisimpatiaj al la movado Esperantista, kiu povas tiel grandege utili por la propagando de la ideoj pri kristana frateco. » (El *La Metropole d'Anvers*, okt. 30-a, 1906.)

Parolado pri Esperanto en Bruselo. — La 21-an de Januaro Abato Richardson, Profesoro ĉe la *Instituto Saint-Louis*, en Bruselo, faris paroladon Angle, ĉe *Le Cercle Polyglotte* pri la temo: *Is an international language possible?* 'Cu lingvo internacia estas ebla? La ĉambrego Gotika de la maljuna *Hotel Ravenstein* estis plena, ĉu de Angloj, ĉu de alilanduloj komprenantaj la lingvon anglan. La Paroladanto komencis memorigante ke, la pasintan jaron, li donis ĉe la sama loko, paroladon pri *L'Entente cordiale* inter la Franca kaj la Angla nacioj. Tiam li ekzamenis la diversajn kaŭzojn de disputoj internaciaj kaj la plej bonajn remedojn kontraŭ tiuj malfacoj. Nun li parolis pri la malfacilaĵoj kaŭzitaj de la diversaj lingvoj.

Li montris facile, ke se estas ebla elpensi lingvon internacian, unu, kaj la saman por ĉiuj, sen tuŝi al la nun

Pripensu ĉiu « mart-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

estantaj lingvoj, certe tio estus rimedo mirinda por grandi la interrilatojn homajn. Tiam li ekzamenis la ecojn tute necesajn por tia lingvo internacia, kaj li trovis precipe du : tia lingvo devas esti tre facila, belsona, ne « ĝargonotika », kiel ekzemple, *Pidgen-English*, kiun oni parolas ĉe la havenoj ĥinaj.

Poste li pruvis la facilecon de nia kara lingvo, kaj montris per ekzemploj sur nigra tabulo la unuajn principojn de la gramatiko kaj la superecon de Esperanto sur la lingvo Angla; kiu tamen estas eble la plej facila el la lingvoj naciaj.

Fine, por montri ke la lingvo ne estas malbela, li komencis paroladeton kun Profesoro Blanjean, la simpatia kaj lerta Prezidanto de la Brusela Grupo.

Oni povas esperi ke tiu parolado helpos tre multe nian sanktan kaj homan kaŭzon. Tutokaze ni admonas multe niajn legantojn samideanajn sekvi tiun ekzemplon, kaj propagandi Esperanton, certe per la presaro, sed ankaŭ per paroladoj popolaj.

En *Le Patriote* de Bruxelles, nia kunlaboranto, S-o J. Wemaes, venke respondis al la fama letero de Grafo d'Haussonville, kaj al alia artikolo titolita *Une morte vivante* (Mortintino vivanta). Tiu lasta artikolo celis elmontri, ke la latina lingvo estas tre vivanta, kaj sola taŭgas, post necesaj aranĝoj, kiel lingvo internacia! S-o Wemaes facile detruis la argumentojn de l'aŭtoro nekonita. Tio estas ekzemplo imitinda.

En broŝuro titolita : *Episkopa vizito de M-ro Heylen, episkopo de Namur, al la paroko « Haltine »*, de J.-B. Servais, parokestro, oni rakontas, pri *Kronogramo* en Esperanto. Kronogramo estas frazo laŭdanta, en kiu kelkaj literoj de l'vortoj estas kalkulataj kiel romanaj ciferoj, por montri la daton de la festo solenigita. Oni scias, ke la romanoj esprimis ciferojn per jenaj literoj

I = 1, U aŭ V = 5, X = 10, L = 50, C = 100, D = 500, M = 1,000.

Jen la Esperanta kronogramo, kiu pleje altiris la rigardojn, ĉe la domo de l'parokestro :

SALVON E'C DANKON 'CAR 'CEESTAS L'EPISKOPO AMATA.

Sekvas en la broŝuro tre simpatiaj linioj pri Esperanto ; kaj fine oni anoncas la apostolan Benon ricevitan de *Espero Katolika*. Tre koran dankon al P-o Servais.

Brave ! la Belgoj ! en via lando baldaŭ la katolikaj Esperantistoj estos la plej multaj kaj la plej fervoraj !

DIVERSLANDA

Germanujo. — S-o Christaller skribas al ni : « En Stuttgart (Virtenbergo) la *Kathol. Lesenverein* (Katolika legunuiĝo) kaj ĝia kasisto fariĝis membroj de la tiea grupo. Du ekzempleroj de *Germana Esperantisto* rondiras inter la membroj ! » Espereble *Espero Katolika* ankaŭ rondiros iam ĉe la anaro de tiu katolika asocio.

Venezuela. — Ni ricevis de S-o Cayo A. Vallenilla ĵurnalon *El Sol*, eldonita en *Porlamar* (Insulo de Margarito). En tiu ĵurnalo troviĝas poezieto en Esperanto titolita : *Memvolaj Izolatoj*.

La Brazila Klubo Esperanta, en Rio de Janeiro abonis *Espero Katolika*.

La Varsovia Societo Esperantisto sendis al ni raporton pri sia agado. Pro ĝia longeco ni ne povas publikigi ĝin. La Societo abonis preskaŭ ĉiujn gazetojn, inter kiuj *Espero Katolika*.

E. P.

PAĜO DE L'DIREKTORO

Administracia Avizo. — De nun la poŝt-oficejo de *Sainte-Radegonde* estas tute sendependa de l'oficejo de

Sendu vian abonpagon HODIAU, vi gajnos o fr. 50.

Tours. Niaj legantoj, niaj kunfratoj, direktoroj de gazetoj, estas petataj *ne plu skribi en nia adreso : apud Tours, aŭ près Tours, aŭ Tours*; sed simple la nomo de l'Direktoro, aŭ la nomo de *Espero Katolika en Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire), France*. — Sama rekomendo por la sendo de poŝtmandatoj (precipe *internaciaj*, ĉar tiuj-ĉi estas pageblaj *nur* en la poŝt-oficejo nomita sur la poŝtmandato ¹.) Povas okazi ke la eksterfrancaj poŝtoŭficejoj ne ankoraŭ konas tiun ŝanĝon, kaj rifuzas adresi poŝtmandaton en *Sainte-Radegonde*. Sed sendanto devas insisti kaj certigi la eblon de la sendo.

Abonmonoj ricevitaj. — La nomaro estas longa. Ni komencos ĝin en la maja N^o. — La nomaro de tiuj, kiuj varbis novan abonanton estas — ni ne tro kuraĝas ĝin diri — tiel mallonga, ke ni atendas por publikigi ĝin. Promesoj estas bonaj, sed agoj estas bonegaj!...

La librejo Pariza Bloud kaj Esperanto. — Tiu ĉi firmo katolika, ni jam diris, estas tre favora al Esperanto. Ĝia katalogo estas tre riĉa per tute modernaj libroj pri religiaj demandoj. La kolekto *Science et Religion* (Scienco kaj Religio) precipe, estas tre ŝatata pro ĝia valoro, diverseco, kaj malkareco (ĉiu volumo da 64 p. in-16 kostas nur 0 fr. 60 afrankite).

Ni ricevis, tute afable, la permeson traduki la librojn de tiu kolekto. Ni do intencas tradukigi la volumojn, kiuj havas internacian intereson, kaj eldoni ilin sub la titolo : *Moderna Biblioteko*.

Jen la intenco... Jen la celo trafota... Sed la realigo estas iafoje tre for de la deziro ! Al ni tute mankas la monaj rimedoj por tiu entrepreno. Ni do hodiaŭ konsultas niajn legantojn kaj amikojn, kaj ni malfermas konkurson pri la plej bona rimedo publikigi nian *Modernan Bi-*

¹ Nur la *kartaj-poŝtmandatoj* internaciaj estas pageblaj en Sainte-Radegonde, la internaciaj poŝtmandatoj enmetosaj en leteroj estas pageblaj en *Tours*.

bliotekon! La premio estos la akcepto de l'plej realigebla rimedo! Ni atendas la respondojn de la konkursantoj!

La Monoferoj. — Kiel oni legis en *Espero Katolika* februara, restas 65 fr. 25 da monoferoj. Ni intencas dediĉi ilin al la presigo de himnoj kaj aliaj presaĵoj por la Tria kongreso. Kredeble la sumo ne estos sufiĉa. Tial ni dankeme ricevos pluajn monerojn por tiu celo.

EN LA MONDO ESPERANTISTA

Raporto pri Esperanto inter blinduloj de Th. Cart.

Pro la graveco de tiu dokumento kaj de ĝia celo ni represas ĝin entute.

I. — HISTORIAJ NOTOJ.

La unuaj personoj, kiuj havis ideon propagandi Esperanton inter blinduloj estas tre verŝajne S-ro Thilander kaj Fr-ino Zabilon d'Her.

Al ili devas iri nia unua dankesprimo.

Jam en fino de l'jaro 1901 oni trovas en ilia korespondado aludon pri la rolo, kiun povus ludi Esperanto en la blindula vivado, kaj jam en sama jaro, S-ro Thilander, tute nova kaj fervorega adepto, verkas por svedaj kaj anglaj revuoj artikolojn favorajn al internacia lingvo. En komenco de 1902 li skribas al rektoro Boirac du entuziasmajn leterojn, sendante kune por franca problindula gazeto artikolon esperantan, kiun tradukas francan S-ro Boirac. Tiu lasta per siaj amikaj kuraĝigantaj leteroj pliigas la fervoron de Thilander.

Aliparte, sub influo de Thilander, S-ro Ahlberg publikigas en Lingvo Internacia (jan. 1902) tre gravan artikolon pri Esperanto inter blinduloj.

Siaflanke D-ro Javal, el franca Instituto kaj D-ro Dor, el Lyon, parolas, kelkajn monatojn poste, en Brusela

Pripensu ĉiu « oktobro-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

problindula kongreso (somero 1902) pri Esperanto kaj preparas la terenon.

Samtempe aŭ iom pli frue familia okazintaĵo, malsano de fileto, estis altirinta mian atenton speciale al tiu demando kaj mi decidis alporti al efektivigo de tia nobla ideo mian plenan energion.

En septembro 1902, dum la libertempoj, kiujn mi pasigis apud Lausanne, mi povis dikti esperantan kurson al blindaj junulinoj el « Asile Recordon ». Ilia fervoro, ilia entuziasmo kuraĝigis min. Dank'al ili, dank' ankaŭ al bonegaj konsiloj de S-roj Thilander kaj Jean-Jacques Monnier el Ĝenevo, oni elektis reliefan alfabeton, taŭgan por Esperanto.

Kiam mi revenis Parizon, mi havis jam gramatikon manuskriptan por blinduloj kaj vortareton.

En Parizo mi trovis amikon tre fervoran kaj alte ŝatindan, profesoron Guilbeau, — ĉe kiu en la unua vizito mi renkontis D-ron Javal. Dank'al prof. Guilbeau multaj eraroj estis evitataj kaj dank'al lia helpo granda nombro da blinduloj estis askirataj al Esperanto en ĉiuj landoj.

Inter la personoj, kiuj kunlaboris jam de l'jaro 1902, mi ne forgesos gesinjorojn Poittevin, kiujn montris al mi nia juna amiko Paul Berthelot. La viro sola estas blinda ; lia edzino rapide lernis esperanton kaj diktis al li grandan parton de la presotaj tekstoj, dum ŝi vendas ĵurnaloj en butiketo de *rue des Feuillantines*.

*
**

En fino de 1902 ĉio estas preta : servistojn ni havas kaj ilojn... nur la necesa mono mankas por utiligi ilin. Sed ni havas amikojn !

La Pariza grupo pagas la unuan eldonon francan de la lernolibro.

S-ro de Beaufront kaj aliaj malavare forlasas parton de la profitoj, kiujn ili eltiras el la vendado de esperantaj verkoj.

Flava etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de Januaro.

El diversaj flankoj venas monoferoj, ofte tre gravaj.

Sed ni ne havas nur amikojn, ni havas ankaŭ apud ni bonan feinon : Fr-inon Zabilon d'Her, kiu, ne forgesinte siajn antaŭajn projektojn, nun « strarigas » loterion por la propagando de Esperanto inter blinduloj, venkas ĉiujn malfacilaĵojn, ĉiun indiferentecon, kuraĝigas unun kaj alian kaj fine, helpita de kelkaj Lyonaj amikoj, post longa klopodo, alportas al ni sumon sufiĉan (pli ol 2,000 fr.) por pagi niajn ŝuldojn al Fratinoj de St-Paul, nia unua presejo, por presigi lernolibrojn en multaj lingvoj kaj eldoni gazeton : « Esperanta Ligilo. »

De nun la sukceso estas certa. Ĝi estas la rezultato de la kunlaborado de multaj ŝindonemuloj. Al ĉiuj, al ne nomitaj kiel al nomitaj, la amikoj de la blinduloj ŝuldiasian dankon.

II. — NUNA STATO.

La blindaj esperantistoj posedas nun sian presejon en Amiens, kie ilia sindona kaj tre lerta blinda presisto S-ro Couillard, profesoro en la Amiens'a Instituto por blinduloj, presis jam multajn lernolibrojn, novelojn, vortarojn kaj presas nian monatan revuon.

Presitaj ekzistas, krom Ekzercaro de D-ro Zamenhof, lernolibroj enhavantaj gramatikon, ekzercaron kaj vortareton en lingvoj franca, germana kaj angla. Komunan parton ili havas, tiamaniere ke, tre facile, oni povas dikti al alilingvanaj blinduloj la tradukon de l'gramatiko kaj de l'vortareto en ilia nacia lingvo. Tio kostas al tiuj ĉi nur kelkajn horojn de laboro.

'Cu aparte, ĉu kiel aldonon de l' « Ligilo » oni presis : *Historio de la blinduloj* de S-ro Guilbeau, Janko Muzikanto, Unua 'Capitro el miaj Memorskriboj de Coppée (trad. Kapitano Capé), Srul el Lubartov (trad. Kabe), Parolado de D-ro Zamenhof en Boulogne-sur-Mer, *Historio de Esperanto*, *Perdita kaj Retrovita*, de S-ro Boirac, k. t. p.

La Esperanta parto de l' « Esperanta Radikaro » enten-

Pripensu ĉiu « Januar-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

ante 3,500 radikojn, estas jam presita kaj oni presas nun la naciajn tradukojn.

Por skribi la tekston de ĉiuj tiuj libroj ni trovis plej sindonan helpon por la angla parto ĉe S-ro Percy O'Merrick kaj por la germana ĉe Fr-ino Rosa Vogt, el Lausanne.

Ne presite sed manuskripte ekzistas aliparte granda parto de Fundamenta Krestomatio, Esperantaj prozaĵoj, Hamleto, Kain, Diversaĵoj, Aŝik Kerib, Monadologio, Kvar tagoj, k. t. p. — Unu el niaj karaj Laŭsannaj lernantinoj, Fr-ino Fanny Ducret, kiun ni havis la grandan doloron perdi antaŭ kelkaj monatoj, kopiis sola sep volumojn de esperantaj rakontoj por aliaj geblinduloj.

« Esperanta Ligilo », kiu ekzistas de majo 1904 havas nun pli ol 150 abonintojn el 17 landoj: 32 en Francujo, 20 en Svedujo kaj Norvegujo, 14 en Danujo, 30 en Aŭstrujo kaj Germanujo, 18 en Anglujo, ceteraj en Belgujo, Bulgariujo, Rusujo, Unuigitaj Ŝtatoj, Brazilujo, Ĉilio, Peruo, Meksiko, Egiptujo, Sudafriko, Aŭstralio, Indio.

Ĝi eliris en 1904 kaj 1905 ses fojojn en la jaro; nun ĝi estas ĉiumonata, espektante la monatojn aŭguston kaj septembron, kaj ĝia reguleco estus imitinda de pli ol unu el niaj revuoj por malblinduloj. Ĝi havas 24 paĝojn kaj havos espereble 32 paĝojn proksiman jaron. La abonprezo estas sama por ĉiuj landoj: 3 frankoj.

*
* *

Esperanton oni nun lernas en multaj blindulejoj: en Parizo (profesoro: S-ro Guilbeau); en St Mandé (profesoro: tre sindona S-ro Van Veersen); en Dijon (kie jam de l'fino de 1902 S-ino Fauvart-Bastoul kun plej laŭdinda fervoro faras kurson); en Belgujo (profesoro: Frato Isidore, unu el la plej lerta propagandisto de Esperanto inter blinduloj); en Praha (profesoro: S-ro Macan, li ankaŭ aktivega kaj tre lerta); en Kopenhavn (profesoro S-ro Wulff, aŭtoro de la plej bona el niaj lernolibroj reliefaj); en

Verda etiketo adresa indikas, ke l'abono komencas de marto.

Tomteboda-Stockholm; en Boston (profesoro S-ro Ed. Harwey, k. t. p.

III. — UTILECO DE LA PROPAGANDO INTER BLINDULOJ.

'Cu ni bezonas montri tie ĉi la grandan utilecon de Esperanto por la blinduloj?

Dank'al Esperanto, kiam tiu lingvo estos tre disvastigita inter ili, siajn librojn ili povos havi por prezo multe malpli granda ol nun, ĉar multe pli da aĉetantoj havos la libroj, ol nunaj libroj, skribitaj en naciaj lingvoj.

Tre malfacile blinduloj povas lerni fremdan lingvon, — ĉar la gramatikoj estas tro komplikitaj kaj tro dikaj ĉiu el ili bezonas multajn volumojn; — ili do tre malfacile konas fremdan belestristikon, fremdan pensmanieron; preskaŭ ĉiam ili vivas en malvasta sfero, por tiel diri. Al ili la kono de Esperanto, komuna lingvo homa, malfermas vere tute novan mondon.

Ne nur grandan literaturan ĝojon ĝi alportos al ili, sed ankaŭ ĝi pligrandigas ilian animan kaj inteligentecan malsklavecon, kaj tiu liberiĝo de l'animo kaj de l'inteligenteco estas trezoro por ili, kiel por ĉiuj, ne tro ŝatinda.

Fine, Esperanto donas al ili komunan ilon por preparoli demandojn koncernante la pliperfektigon de iliaj specialaj vivadaj kondiĉoj kaj estas inter ili ĉiuj tre dolĉa ligilo per amika kunfrata internacia korespondado.

*
* *

Por nia afero ankaŭ la divastigado de Esperanto inter blinduloj havas grandan utilon.

Se blinduloj uzas inter si Esperanton, kiel do ne povus, ankoraŭ pli facile, vidantoj ĝin uzi? Nenia pli trafanta pruvo pri la facileco kaj la taŭgeco de nia lingvo.

Aliparte oni povas certigi, ke neniu monda okazintaĵo, kiel grava ĝi estus, neniu revolucio, neniu milito povos estingi tiun malgrandan flamon, kiu nun brilas en aparta mondeto.

Sufiĉas, certe, ke tiuj modestaj servistoj de nia ideo, modestaj inter modestaj, povu esti ian tagon kiel la

Pripensu ĉiu « mart-ulo » ĉu li pagis sian abonon...

gvardistoj de l'sankta fajro, por ke ni estu dankemaj al ili kaj interesigu pri ilia sorto.

IV. — RIMEDOJ POR PROPAGANDI.

Eble kelkaj el vi demandos, kiamaniere oni povas helpi al esperantaj blinduloj.

Tio estas tre facila.

1^e 'Ciu nacia gazeto esperanta kolektu monsumon por plifaciligi al kelkaj blindaj esperantistoj el sia lando la venon al proksima Kongreso, kie, laŭ mia espero, ni povos havi ĝeneralan kunvenon de esperantistaj blinduloj, — facile 40 aŭ 50 ili estos.

2^e 'Ciu nacia gazeto esperanta kolektu monsumon por publikigi ĉu naci-esperantajn vortarojn, ĉu lernolibrojn naciajn pli elementajn, ol estas la nunaj.

3^e Oni daŭrigu sendi al Esperanta Ligilo nur la monon difinitan por ĝenerala internacia propagando inter blinduloj aŭ presado de verkoj pure esperantaj Hamleto, Fundamenta Krestomatio, k. t. p.

*
**

Kaj nun : kiu havas tro da mono, donu monon !

Kiu ne havas monon sed havas tempon, lernu skribi reliefe, — tio estas tre facila, — kaj kopiu por blinduloj de sia nacio esperantajn librojn !

Oni ankaŭ povas dikti al blinduloj esperantajn librojn aŭ legi al ili niajn gazetojn.

'Ciuj povas paroli pri Esperanto al blinduloj aŭ al amikoj de blinduloj kaj varbi tiamaniere bindajn adeptojn.

Se oni nur *vere* deziras esti utila al blinduloj, facile tion oni povas.

Lasu nur, karaj samideanoj, via koro serĉi rimedon !

Aŭgusto 1906.

Th. CART.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2, Aŭstrujo.)

Pro troa okupado nia sindona kunlaboranto S-o. John

Memoru, ke ni devas aldoni ofr. 50 pro pagigo per poŝto aŭ banko.

Ellis bedaŭrinde devas ĉesi sian redaktadon de la ŝakrubriko en *Espero Katolika*, kiun li jam de du jaroj akurate kaj lerte verkadis. S^o Alex. Wagner, Stanislau 2 (Aŭstrujo) prenis sur sin la laboron de S-o Ellis kaj verkos de nun nian ŝakrubrikon. Li petas la ŝakludantojn sendadi la solvojn kaj originalajn problemojn sur poŝtkartoj rekte al lia adreso.


Ni publike esprimas niajn plej sincerajn dankojn al S-o Ellis, kiu tre sindoneme kunlaboradis en *Espero Katolika*. Oni povas diri, ke li *kreis* la ŝakludan terminaron : tasko malfacila kiun li tre klare kaj lerte plenumis.

S-o Ellis restas tamen sekretario de la *Societo de Esperantistoj Ŝakludistoj*, ankoraŭ tre modesta, sed kiu certe progresados. Ni rememorigas, ke ŝakturniro estas preparata por la Tria kongreso. Tiuj, kiuj deziras partopreni ĝin sendu sian adreson al S-o Ellis, en Keighley, Anglujo.

Problemo XI-a (originala)

Komponis Rich. Kindley
(Adelaide)

Nigro : 10 pecoj.



Blanko : 8 pecoj.

Blanko Komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

La batalo inter Lasker kaj Marshall por la ŝakmajstreco de l'Mondo, finiĝis en humiliga malvenko de Marshall.

Lasker, amerika probatalanto gajnis 8 ludojn kaj nuligis 7. Marshall gajnis, O ! Unu fojon plie Lasker ĝustigis la opinion de Steinitz, kiu konsideris la Amerikan venkanton, kie la plej lertan ŝakludiston, kiun oni vidis iam, eĉ ne esceptante Morphy.

Nun S-o Schlechter, Viena probatalanto, intencas elvoki Lasker. La batalo estos plej alloga.

Le Gérant : L. MONTEBAULT.

Imprimerie-Librairie de Montligeon. — La Chapelle-Montligeon (Orne).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono: 23 fr. (En Francl. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

JUNA ESPERANTISTO, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

✧ **LE SOUVENIR**. Monata ĵurnalo literatura: 1 frank. Unuiĝo poŝta 1 fr. 50. Direktoro Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro. B^d Anspach, 83, Bruxelles.

KOLEKTISTOJ: S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj skribi por pluaj sciigoj al la Direktoro

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO

NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS

AKCEPTAJAJ SAMTEMPE

(10-7)

PENSIO POR GESINJOROJ GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

FONTAN-PLUMINGO « FACULTY ». — Ni esperas plaĉi al niaj legantoj vendante al ili tiun bonegan « Skribilon ». La « Fontan-Plumingo », aŭ plumingo kinj enhavas inkon, estas ordinare tre multekostaj (10 aŭ 12 fr.). Post konsento kun vendisto ni povas liveri la « Faculty » plumingon por la nekredebla prezo de 3 fr. 75 (prenota en nia Oficejo), aŭ 3 fr. 90 a frankite kaj rekomendite.

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*). Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P-o Em. Peltier. Eldonita de Pariza firmo Bloud.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Eskter Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K. — Specimenon senpage.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOF. — Ĉe Hachette k. K^o Paris. — Jare, Francujo Fr. 6; ceteraj landoj : Fr. 7.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, la plej malnova gazeto (1895), eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono 5 fr. — Kun Literatura Aldono 7 fr. 50. Specimeno senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco; industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝejoj.

Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI (2-a eldon.) 0 fr. 65

Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI 1 fr. 80
(Aĉetebblaj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

PREĜARO (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun ekpresigis (por la subskribintoj). 3 fr. »
Unua kajero (por ne subskribintoj). 2 fr. 50

EN PRESADO : *Hebrea Kalendaro*, 16-paĝa broŝuro, de Pastro Jakobo BIANCHINI 0 fr. 20